// BULTENO

## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 32 Aprilo 1929

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redakcejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

La kunsido de la administra konsilantaro. — Konfirmoj de Konvencioj. — Paĝo pri kooperado.

## La kunsido de la Administra Konsilantaro

### Grava debato pri okhora labortago.

La Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo komencis sian 43-an kunsidon, lundon, 11-an de Marto 1929, per grava debato pri okhora labortago. La debato daŭris du tagojn.

La Ministroj de Laboro de Francujo, Germanujo kaj Granda Britujo, Sroj Loucheur, Wissel kaj Sir Arthur Steel-Maitland, ĉeestis.

La Direktoro, Sro. Albert Thomas, rememorigis kiel la demando estas starigita antaŭ la Konsilantaro. La konsilantoj ricevis projekton de raporto pri la apliko de la Okhora Konvencio. La Konsilantaro nun devas : (1) definitive starigi la formon de tiu raporto ; (2) decidi, ĉu oni simple transdonu la raporton al la Konferenco, aŭ sekvu la procedon por la revizio de la konvencio.

Sir Arthur Steel-Maitland postulis la revizion de la Konvencio. Li certigis la fidelecon de sia Registaro kaj de sia lando al la principo de la ok horoj. Praktike la Britaj industrioj aplikas la okhoran tagon. Kial do Granda Britujo ne konfirmas la internacian konvencion de Washington ? Tial, ke tiu konvencio enhavas punktojn kiuj donas okazon al dusenceco kaj permesas al la aliĝintoj diversajn interpretojn. La parolanto tial proponis, ke oni difinu pli klare la esprimojn « labordaŭro » « labor-horoj », « semajno ». Li sugestiis, ke, anstataŭ lasi al la kompetenta aŭtoritato de ĉiu lando la difinon de la limo inter industrio unuflanke kaj komerco, agrikulturo aliflanke, tiu limigo estu farita en la konvencio mem. Li ankaŭ deziras precizigojn pri la esceptoj permesataj okaze de laborakcidentoj kaj forto deviga, kaj pri kontinuaj laboroj. Li ankaŭ postulas, ke la Konferenco ekzamenu la problemon starigitan en kelkaj landoj pri la situacio de malgrandaj establaĵoj okupantaj ne pli ol kvin laboristojn. Li dezirus pli da fleksebleco en la povo, konsentita en iuj okazoj, por dividi la normajn 48 horojn tra la tuta semajno. Tiu divido estas permesata de la konvencio nur kondiĉe, ke la taga daŭro plej longa ne superu 9 horojn. La Brita Registaro dezirus, ke la divido povu fariĝi inter kvin aŭ eĉ kvar tagoj en unu semajno, kio rezultigus labortagon de pli ol 9 horoj. La Brita propono pri revizio koncernas ankaŭ, interalie, la reguligon de ekstraj horoj, la malfacilaĵojn pri apliko al iuj transport-entreprenoj kaj la artikolon permesantan la interrompon de la apliko de la konvencio en ĉiu lando, per ordono de la Registaro, okaze de milito aŭ okazintaĵoj danĝerigantaj la nacian trankvilecon.

Finfine, Sir Arthur Steel-Maitland deklaris, ke, se oni sukcesus starigi tekston sufiĉe prizorgantan tiujn punktojn, la Brita Registaro konfirmus la konvencion tiel reviziitan.

S-ro Poulton, Brita laborista delegito, esprimis bedaŭron, ke bezonis naŭ jaroj kaj kvin monatoj, por ke la Brita Registaro decidu fari la paŝon faritan hodiaŭ. Pli utilaj rezultatoj povus esti atingitaj antaŭ kelkaj jaroj. Li ekzamenis la diversajn punktojn diskutitajn de la Ministro, kaj opiniis, ke pri neniu el ili Granda Britujo trovus malfacilaĵojn en la apliko de la konvencio. Belgujo konfirmis la konvencion kaj ne trovas malfacilaĵojn por apliki ĝin. La projekto de raporto preparita de la Oficejo montras, ke same okazis por la aliaj landoj konfirmintaj la konvencion. Li ne povas ne suspekti, ke la sintenado de la Britaj mastroj ne estis tute fremda al tiu de la Registaro. Li opiniis, ke la Konsilantaro devas decidi rapide. La situacio de sia lando estas speciale delikata, ĉar pluraj grandaj ŝtatoj konfirmis la konvencion, kondiĉe de la konfirmo de Granda Britujo. La laboristoj ne ĉesos postuli la konfirmon de la okhora konvencio.

S-ro Jouhaux, delegito de la francaj laboristoj, diris, ke kelkaj registaroj konstante trovas novajn malfacilaĵojn por prokrasti la konfirmon de la konvencio. Oni povis opinii, post la konferenco de Ministroj en Londono 1926, ke la malfacilaĵoj estas venkitaj kaj ke interkonsento estas atingita pri la interpreto de la konvencio. Nun oni proponas ĉion rekomenci. Li dubas, ĉu la akcepto de la brita propono rezultigus definitivan decidon, ĉar ĝi ĝenus la ŝtatojn jam konfirmintajn. La laborista grupo faris ĉion por faciligi akordon, sed senutile. Ĝi ne povas akcepti la proponon de la Brita Registaro. Li legis deklarojn de reprezentantoj de ŝtatoj, kiuj jam konfirmis la konvencion kaj aplikis ĝin sen malfacileco. La teksto akceptita en Washington estis la teksto de la Britaj delegitoj. Poste, antaŭ kvar jaroj, la Registaroj konsentis kun la Brita Registaro pri la interpreto de la konvencio. Dum kvar jaroj la Brita Registaro nenion faris, kaj nun ĝi prezentas sian proponon. Li petas la Konsilantaron, ke ĝi profunde pripensu la aferon ĉar ĉio, kio ŝancelas la okhoran konvencion, ŝancelus la konfidon de la laboristoj al la Internacia Labora Organizaĵo.

S-ro Wissel, Ministro de Laboro de Germanujo, diris, ke la germana leĝo pri la protekto de la laboristoj, lastatempe akceptita de la Reichstag, estas inspirita per la okhora konvencio kaj permesus la konfirmon de la konvencio. Estas klare, ke la revizio de la konvencio ŝancelus la konfirmadon nun konsideratan en diversaj ŝtatoj, aŭ ĉiuokaze prokrastus ĝin .Li rimarkigis, ke la punktoj difinitaj de la Brita Registaro estas 15. Estas do preskaŭ ĉiuj aranĝoj de la konvencio, kiuj estas koncernataj. Ne estas eble antaŭvidi la rezultatojn de revizio. Li sugestiis, ke oni povus konservi la nunan konvencion, aldonante al ĝi la protokolon pri interpreto, konsentitan de la Ministroj de Laboro en Londono en 1926, kiun la laborista grupo estas inklina por akcepti. Li petis la Britan Registaron, ke ĝi konsideru la eblecon aprobi tian proceduon.

S-ro Vogel, germana mastra delegito, deklaris, ke la mastra grupo aprobas la proponon de la Brita Registaro.

S-ro Mahaim, reprezentanto de la Belga Registaro, energie kontraŭstaris la britan proponon. Li dankis la Britan Ministron, ke li fine alportis la precizigojn, kiujn oni tiel ofte postulis, sed ne ŝajnas al li ke tiuj precizigoj faciligos la situacion de la konvencio, nek la situacion de Belgujo, kiu jam konfirmis ĝin. Se temus nur pri aldono de la Londona protokolo, Belgujo ne kontraŭstarus, ĉar ĝi subskribis tiun protokolon. Sed Belgujo ne akceptos iun proponon pri revizio, kiu rediskutigus konvencion, kiun Belgujo aplikas nereciproĉinde.

S-ro Forbes-Watson, brita mastra delegito, apogis la proponon pri revizio prezentitan de la Brita Registaro. Li kontraŭstaris la Londonan protokolon kaj la Washingtonan konvencion, kiun li kritikis detale.

S-ro Loucheur, Ministro de Laboro de Francujo, klarigis la situacion de sia lando pri la problemo de la ok horoj. Francujo konfirmis la Washingtonan konvencion kondiĉe de la konfirmo de Germanujo kaj Granda Britujo.

S-ro Forbes-Watson diris en sia parolado, ke la kondiĉaj konfirmoj devigas al nenio.

S-ro Loucheur respondis, ke lia lando, tiel konfirmante, konsciis sin devigi al multo. « Kaj cetere », li diris, « se tio ne devigas al io, mi nur deziras, ke la lando de S-ro Forbes-Watson, faru tiel kiel la mia ».

Li ekzamenis la proponon de sia brita kolego kaj sin demandis al kio ĝi kondukus, se ĝi estus akceptita. Se oni sciiĝus morgaŭ, ĉe la laboristaro de la mondo, ke la Administra Konsilantaro transdonis al la Konferenco por ekzameno, la punktojn montritajn de Sir Arthur Steel-Maitland, oni ne povus eviti, ke tiu decido estu komprenata kiel aprobo de la kritikoj faritaj kontraŭ la Washingtona konvencio. La Franca Registaro volonte akceptus proceduon por aligi al la Washingtona konvencio la precizigojn konsentitajn en la interministra kunveno en Londono. Sed en la brita propono troviĝas punktoj prezentitaj al la Konsilantaro la unuan fojon. Ĉu oni povas tiel postuli ĉiutage la difinadon kaj precizigon de novaj punktoj ?

S-ro Loucheur atentigis la Konsilantaron kontraŭ la danĝeroj de revizio. Eĉ laŭ la vidopunkto de la mastroj, tio ne estus dezirinda, ĉar la Registaroj estas efemeraj, kaj revizio komencita laŭ unu senco povus tre facile finiĝi laŭ senco tute kontraŭa.

La franca ministro defendis la konvencion kontraŭ la riproĉo pri elasteco. Ĉu ne estas pli bona merito, ke la konvencio lasas iom da flekseblеco al la naciaj leĝdonoj ? Se ĝi estus pli preciza, ĉu oni ne pretekstus ĝian troan rigidecon, por ne konfirmi ĝin ?

Finfine, li diris, ke la Franca Registaro estas preta por fari ĉion eblan por faciligi al Granda Britujo la konfirmon de la konvencio, kondiĉe ke la konvencio mem ne estu kompromitata. Li petas la Britan Registaron, ke ĝi kontentiĝu per la aldono al la konvencio de la Londona protokolo.

S-ro Mertens, belga laborista delegito, kaj S-ro Muller, germana laborista delegito, ankaŭ kontraŭstaris la britan proponon.

S-ro de Michelis, reprezentanto de la Itala Registaro, deklaris, ke lia Registaro ne povas aliĝi al la Brita propono. La Itala Registaro akceptis la Londonan akordon, por faciligi la konfirmon de Granda Britujo, sed deklarante, ke ĝi metas al la bazo de la akordo la netuŝeblecon de la Washingtona konvencio. Li konservas tiun sintenadon hodiaŭ kontraŭ la angla tezo, postulanta pli larĝan revizion, kaj kontraŭ la germana tezo, al kiu Francujo ŝajnas aliĝi, kiu limigus la revizion per la punktoj en la Londona akordo. Li ne pensas, ke la aldono de tiu akordo al la konvencio donas la rezultaton deziritan, ĉar la anglaj juristoj diris, ke Granda Britujo ne povus konfirmi la konvencion, eĉ se la Londona protokolo estus aligata al ili. En tiuj cirkonstancoj, konvenas kontentiĝi per la konvencio, kiun Italujo konfirmis, kaj kiun ĝi sin devigos apliki, kiam estos faritaj la konfirmoj, de kiuj ĝi dependigis la efektivigon de la sia.

S-ro Molin, reprezentanto de la Sveda Registaro, klarigis la situacion en sia lando pri la okhora labortago. Pro tiu situacio, Svedujo estas favora al la revizio de la konvencio.

S-ro Lambert-Ribot, franca mastra delegito, diris, ke la malfacilaĵoj koncernas ne nur la interpreton, sed ankaŭ la fundamentojn. Kelkaj ŝtatoj konfirmis la konvencion, sed ne sufiĉe multaj. Depost kelkaj jaroj, oni serĉis fari akordojn inter Registaroj de grandaj potencoj. Laŭ S-ro Lambert-Ribot, tio estas malbona metodo, kontraŭa al la spirito de la Kontrakto. Krom tio, ĝi ne sukcesis. Li estis do surprizita, kiam li aŭdis la Ministron de Laboro de sia lando proponi, ke oni persistu en tiu vojo, aldonante la Londonan protokolon al la konvencio. Cetere, tiu aldono estus senutila, se ĝi ne certigus la britan konfirmon. Li vidis nur unu rimedon : tiun, kiun li proponis en 1927 : fari kompletan ekzamenon en kiu ĉiu povus esprimi sian opinion. Tiucele, oni povus starigi komisionon, por studi la tutan problemon. Li ne volas tuŝi la principon de la konvencio, sed nur venki la malfacilaĵojn.

S-ro Sokal, reprezentanto de la Pola Registaro, rimarkigis, ke la Konsilantaro deflankiĝus de sia tagordo, se ĝi sin limigus per diskuto de la Brita propono, ĉar la tagordo celas la ekzamenon de la projektoj de raportoj preparitaj de la Oficejo pri la apliko de du konvencioj akceptitaj en Washington 1919, unu el kiuj estas la Okhora Konvencio. Li proponis la starigon de komitato por ekzameni samtempe la dokumentaron kolektitan de la Oficejo, la Britan proponon por revizio kaj la Svedan deklaron. La komitato raportus al la Konsilantaro en sia maja kunsido.

S-ro de Altea, reprezentanto de la Hispana Registaro, diris, ke lia Registaro konfirmis la konvencion, kondiĉe de la konfirmo de aliaj ŝtatoj. Tial ĝi kontraŭstaras revizion kiu ŝanĝus la signifon de la konvencio, sed ĝi volonte konsiderus eblajn partajn modifojn, kiuj permesus la konfirmon de Granda Britujo.

Post parolado de S-ro Khaitan, delegito de la hindaj mastroj, S-ro Poulton, brita laborista delegito, parolis denove per atentigi pri la situacio de Granda Britujo post la deklaroj de la reprezentantoj de aliaj ŝtatoj.

S-ro Jouhaux diris ke, se oni decidos por revizio, la laboristoj respondos al ĉiuj proponoj por limiga revizio per proponoj por plivastiga revizio. Oni diras ke, se la nuna teksto estos konservita, Granda Britujo ne konfirmos. Sed ŝajnas ke Germanujo intencas konfirmi, kaj tio tre faciligos la situacion de Francujo. Estas do eble ke venos tempo, kiam nur unu granda industria lando restos aparte de la laborkondiĉoj akceptitaj ĉie alie.

S-ro Yoŝisaka, reprezentanto de la Japana Registaro, esprimis la deziron, ke la Konsilantaro trovu al la nuna problemo solvon, kiu faciligos la konfirmon de la konvencio.

Tiam la Konsilantaro voĉdonis pri diversaj proponoj.

Propono de S-ro Khaitan, hinda mastra delegito, por tuj malfermi la procedon por revizio, estis malakceptita per 12 voĉoj kontraŭ 9 (la 6 voĉoj de la mastra grupo kaj la voĉoj de la Brita, Hinda kaj Sveda Registaroj).

Propono de S-ro Lambert-Ribot, franca mastra delegito, por tuja konsulto de la ŝtatoj kaj starigo de speciala komisiono de la Konferenco, estis malakceptita per 13 voĉoj kontraŭ 7 (la mastra grupo kaj la Brita Registaro).

Alia propono de S-ro Lambert-Ribot, por konsulto de la ŝtatoj, estis malakceptita per 11 voĉoj kontraŭ 6.

Finfine la Konsilantaro malakceptis du proponojn por prokrasti la decidon ĝis la kunsido en Majo, unu de Sir Arthur Steel-Maitland, kiu estis malakceptita per 8 voĉoj kontraŭ 8, kaj la alian de S-ro Sokal, kiu estis malakceptita per 9 voĉoj kontraŭ 7.

Tial la demando restas sendecida. Tamen, la konsilantaro estos certe invitata, antaŭ 1931, por definitive decidi, ĉu ĝi rekomendos al la Konferenco la ekzamenon de la demando pri revizio de la konvencio.

La Konsilantaro decidis, per 12 voĉoj kontraŭ 10, ne aldoni novan demandon al la tagordo de la Konferenco en 1930. Tiu kunsido estos do dediĉita al la eventuala dua diskutado de la demandoj enmetitaj por unua diskutado en la tagordo de la kunsido de 1929, tio estas, deviga laboro de indiĝenoj kaj laborhoroj de oficistoj.

## Konfirmo de Konvencioj

### Francujo konfirmis la Konvencion pri reenpatrujigo de maristoj.

La Internacia Laboroficejo estas sciigita, ke Francujo konfirmis la Konvencion pri reenpatrujigo de maristoj.

Tiu konvencio estis akceptita de la Internacia Labora Konferenco en ĝia Naŭa Kunsido (Genève, 1926). Ĝi ordonas, ke ĉiu maristo, elŝipigita dum aŭ ĉe la fino de sia kontrakto, rajtas esti reportata, ĉu al sia patrolando, ĉu al la haveno, kie li estis dungita, ĉu al la haveno el kiu la ŝipo foriris. La Konvencio estis jam konfirmita de Belgujo, Estonio, Kubo kaj Luksemburgo.

### Ĉeĥoslovakio konfirmis la konvenciojn pri asekuro kontraŭ malsano

La Internacia Laboroficejo ĵus estis sciigita, ke Ĉeĥoslovakio konfirmis la konvencion pri asekuro kontraŭ malsano por laboristoj en industrio kaj komerco kaj por domservistoj kaj la konvencion pri asekuro kontraŭ malsano por agrikulturaj laboristoj.

Tiuj du konvencioj estis akceptitaj de la Konferenco en ĝia deka kunsido (1927). La unua estis jam konfirmita de Germanujo, Hungarujo kaj Luksemburgo kaj la alia de Germanujo kaj Luksemburgo.

### Svislando konfirmas la konvencion pri egaleco de traktado por fremdaj kaj naciaj laboristoj.

La Internacia Laboroficejo ĵus sciiĝis, ke Svislando konfirmis la konvencion pri egaleco de traktado por fremdaj kaj naciaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj.

Tiu konvencio estis akceptita de la Internacia Labora Konferenco en ĝia sepa kunsido (1925). Ĉiu Ŝtato konfirmanta ĝin sin devigas fari al la nacianoj de ĉiu alia Ŝtato konfirminta la konvencion, kiuj fariĝas viktimoj de laborakcidentoj en sia teritorio, aŭ al iliaj dependantoj, la saman traktadon, kiun ĝi faras al siaj propraj nacianoj pri kompenso pro laborakcidentoj.

Nuntempe 21 Ŝtatoj konfirmis tiun konvencion : Aŭstrio, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Granda Britujo, Hindujo, Hungarujo, Italio, Japanujo, Kubo, Latvio, Luksemburgo, Nederlando, Polujo, Jugoslavio, Svedujo, Svislando kaj Sudafriko.

### Aŭstrio konfirmis la konvenciojn pri asekuro kontraŭ malsano

La Internacia Laboroficejo ĵus estis sciigita, ke Aŭstrio konfirmis la konvencion pri asekuro kontraŭ malsano por laboristoj en industrio kaj komerco kaj por domservistoj kaj la konvencion pri asekuro kontraŭ malsano por agrikulturaj laboristoj.

Tiuj du konvencioj estis akceptitaj de la Konferenco en ĝia deka kunsido (1927). La unua estis jam konfirmita de Ĉeĥoslovakio, Germanujo, Hungarujo kaj Luksemburgo kaj la alia de Ĉeĥoslovakio, Germanujo kaj Luksemburgo.

La konfirmo de tiuj konvencioj devigas la konfirmintan Ŝtaton starigi devigan asekuron kontraŭ malsano por ĉiuj laboristoj kaj lernoservantoj en industriaj, komercaj kaj agrikulturaj entreprenoj, eksternaj laboristoj kaj domservistoj.

### Hispanujo konfirmas la okhoran konvencion

Oni memoras, ke lastan jaron, kiam S-ro Albert Thomas vizitis Madrid, la Hispana Registaro anoncis sian decidon, konfirmi kondiĉe la Washingtonan Konvencion pri la okhora labortago ; tiu konfirmo estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 22an de Februaro. Ĝi fariĝos efektiva nur kiam la Konvencio estos konfirmita ankaŭ de Francujo, Germanujo, Granda Britujo kaj Italujo.

Hispanujo samtempe konfirmis senkondiĉe la Konvencion pri kompenso pro laborakcidentoj kaj la Konvencion pri egala traktado de naciaj kaj fremdaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj. Ĉi tiuj konvencioj estis akceptitaj de la Internacia Labora Konferenco en 1925.

### *Ruslando.*

*Koopera organizo de kotonproduktantoj. Noto.*— La materialo por tiu ĉi artikolo estis kontribuita *en Esperanto* de Rusa Esperantisto en Meza Azio.

Kiel memstara sistemo la kotona kooperado ekzistas en Ruslando nur de du jaroj. Pli frue ĝiajn funkciojn plenumis la ĝenerala sistemo de vilaĝa kooperado. Sed rapida kreskado de kotonproduktado kaj aliaj kaŭzoj necesigas spartan organizon ĉe kotonproduktantoj.

Kreskanta teksindustrio postulas grandegan provizon de krudaĵo. La kotonkooperativoj organizas la kotonproduktantojn, disdonas al ili antaŭ pagojn konte de la Ŝtato, provizas ilin per semoj kaj maŝinaro, kaj aĉetas la rikolton por la Ŝtato. Tiel la kotonkooperativoj fariĝis la peranto inter la Ŝtato kaj la privataj produktantoj de kotono. Ili ankaŭ instruas al kamparanoj pri plibonigo de produktaj metodoj, akvigo, uzo de artefarita sterko k. t. p.

La antaŭpagoj aranĝitaj estas meze po 8,37 rubloj por hektaro. Ili estas repagataj per la fina reguligo por centfunto da kotono vendita, aŭ po 70 rubloj de la kontoj ĉe la liverado de la rikolto.

La jena tabelo, ĉerpita el la Bulteno de la Panrusa Centrorganizo de Kotonkooperativoj, montras la situacion de la kooperativoj en 1928 :

| Respubliko | Nombro da unuiĝoj | Kooperativoj en la unuiĝoj | Membroj | Areo plantita (en hektaroj) | Kvanto da kotono vendita en 1928 (en centfuntoj). |
|---|---|---|---|---|---|
| Uzbekio.... | 13 | 324 | 558.074 | 626.138 | 5.648.320 |
| Jaĝikio ... | 1 | 24 | 21.765 | 42.889 | 257.260 |
| Turkmenio | 3 | 101 | 143.930 | 115.604 | 1.024.870 |
| Kazakio... | 1 | 18 | 28.672 | 42.946 | 297.450 |
| Kara-Kalpakio.. | 1 | 18 | 30.009 | 27.409 | 227.090 |
| Kirgizio. .. | 1 | 18 | 28.873 | 45.977 | 389.230 |
| Azerbajĝano | 1 | 52 | 84.394 | 123.207 | 755.870 |
| Armenio .. | 1 | 14 | 16.481 | 21.976 | 160.420 |
| Entute | 22 | 569 | 912.198 | 1.046.146 | 8.760.510 |

Ĉar la enlanda produkto de kotono kontentigas apenaŭ duonon da efektiva bezono de la industrio, la Ŝtato starigas antaŭ la kooperado la problemon, pligrandigi la areon plantatan per kotono kaj plimultigi ĝian produktadon ĝis tia grado, ke la bezono de la industrio estu kontentigata per enlanda produkto. Laŭ la opinio de kelkaj kooperantoj, la rezultatoj jam atingitaj de la movado ĉe le sojlo de ĝia ekzisto permesas la esperon, ke ĝi solvos tiun problemon.

### *Hungarujo.*

*La Koopera Societo de la publikaj oficistoj.*

*Noto.* — Tiu ĉi artikolo estas ankaŭ bazita sur materialo kontribuita *en Esperanto* de Esperantista korespondanto.

La Koopera Societo de la Publikaj Oficistoj de Hungarujo estis fondita en 1892. En 1893, ĝi havis 1.534 membrojn. Post dek jaroj la nombro da membroj estis 5.869 ; en 1923 30.833, kaj en 1927, 39.844- Ĝia spezo ankaŭ konstante progresis. Ĝi estis 31.000.000 pengoj en 1927. Ĝia kapitalo estas 1 mil. 100.000 kaj la ŝpardeponaĵoj ĉirkaŭ 4 milionoj.

En 1928 ĝi posedis en Budapest kaj alie 107 centrojn por disdonado de nutraĵoj kaj 11 vendejojn por teksaĵoj kaj vestaĵoj. Aliaj fakoj traktas meblojn, hejtaĵon, librojn.

### *Ĉinujo.*

*La agrikulturaj kreditkooperativoj batalas kontraŭ malsato.*

Raporto de Novembro 1928, komunikita al la Internacia Laboroficejo, donas interesajn informojn pri la laboro farita dum la lastaj ses jaroj de la Komitato pri agrikultura kooperado de la Internacia Komisiono por helpo kontraŭ malsato en Ĉinujo.

La komitato opinias, ke la provizo de kredito por la kulturistoj per malaltaj procentoj estas ataki la malsaton en ĝia esenco.

La unua agrikultura kreditkooperativo estis fondita en Julio 1923, iniciate de la Komisiono. Ĝi havis 30 membrojn. La movado konstante kreskis. En Januaro 1924 ekzistis 7 societoj kun 245 membroj ; en Januaro 1925, 13 societoj kun 416 membroj ; en Januaro 1926, 129 societoj kun 3.062 membroj ; en Januaro 1927, 349 societoj kun 7.957 membroj ; kaj en Januaro 1928, 572 societoj kun 14.340 membroj. La lastaj ciferoj ricevitaj apartenas al Oktobro 1928 kaj montras 591 societojn kun 14.910 membroj.

La pruntoj de la societoj estis utiligitaj de la prunteprenantoj por la jenaj celoj :

| Jaro. | Aĉeto de semoj kaj furaĝo, elspezoj por kulturo. | Veturiloj, brutaro, ilaro kaj riparo de konstruaĵoj. | Traakvigo, drenado kaj repago de ŝuldoj. | Domindustrio kaj metio | Edziĝo, enterigo, ktp. |
|---|---|---|---|---|---|
| 1924 | 29,54 % | 30,34 % | 8,91 % | 23,12 % | 8,09 |
| 1925 | 52,34 % | 13,11 % | 19,06 % | 14,79 % | 0,72 |
| 1926 | 27,18 % | 35,02 % | 20,59 % | 11,59 % | 5,60 |
| 1927 | 35,33 % | 45,30 % | 7,94 % | 10,02 % | 1,39 |

Oni vidas, ke la plej granda parto de la pruntoj estis utiligata por produktaj celoj. Aliflanke, la bezonoj kreataj de la sociaj kaj familiaj devoj estas tiel urĝaj, ke la malriĉaj kamparanoj nepre devus sin turni al procentegistoj, se ili ne povus prunte preni de la kooperativoj.

La malgrandeco de la individuaj pruntoj montras, ke la kooperativoj vere helpas al plej malriĉaj personoj kiuj plej suferas de malbonaj rikoltoj. Jen la rezultatoj de enketo pri 132 pruntoj por S 72.000 sume, donitaj de la Komisiono al la Kooperativoj depost 1924 kaj disdonitaj de la kooperativoj en 3570 apartaj pruntoj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| 557 | kulturistoj prenis de ilia kooperativo po malpli ol | dolaroj | 10, |
| 2223 | » » | » | 20, |
| 421 | » » | » | 30, |
| 157 | » » | » | 40, |
| Nur 107 | » » | » | 50, |

La sumo de la kreditoj aranĝitaj estas S 87.253. Laŭ la procento ordinara en la distriktoj, tiu sumo kostus, en tri jaroj, S 94.233.24. Laŭ la procento fiksita de la Komisiono : 6 %, ĝi kostis, por la sama tempo, nur S 15.705,54. Alivorte, la prunteprenitoj ŝparis S 78.527,70, sumo kiu sufiĉas por nutri ĉirkaŭ 3.000 personojn dum unu jaro, laŭ la loka preznivelo.

ANNEMASSE. — IMP. P. GRANCHAMP